



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro : 2 2022

ĈU EKSA HISPANA REĜO POVAS ESTI JUĜATA EN BRITIO ?

Corinne Larsen, amantino de la eksa hispana reĝo Johano Karlo la 1-a, plendis ĉe brita tribunalo, ĉar ŝi konsideras, ke li devus pagi al ŝi reparacion pro la molestoj kaŭzitaj de la hispanaj sekretaj servoj.

La eksa amantino de Johano Karlo la 1-a, kiu estis hispana reĝo de 1975 ĝis 2014, deklaris, ke la hispanaj spionoj kontrolis ŝian telefonon kaj komputilon. Pro tio, ŝi sentis grandan maltrankvilon, angoron kaj ŝi eĉ domaĝis sian sekurecon.

Laŭ la advokato de la hispana eksa reĝo, la sola tribunalo kiu rajtas juĝi lin estas la Supera Hispana Tribunalo, ĉar li ĝuas suverenajn rajtojn kaj oni ne povas juĝi lin eksterlande. Sed la kontraŭa advokato rimarkigis, ke li ne estas, sed estis, reĝo, do, li ne estas suvereno nuntempe kaj oni povas juĝi lin kie ajn.

La advokato de la eksa reĝo baziĝas sur hispana leĝo, laŭ kiu estas membroj de la familia reĝo, krom la gereĝoj

mem, la gepatroj kaj la tuta idaro. Tiel, ne estas necese agadi kiel reĝo por esti konsiderata membro de familia reĝo kaj ĝui ties imunecajn privilegiojn.



La advokato ankaŭ diris, ke la rilatoj inter la eksa reĝo kaj lia amantino tute ne rilatis kun Britio, ĉar ili kune vojaĝis en Monakon, Svision, Abudabion kaj Tahition. Do, nenia ligilo konektas ilin kun Britio.

Pro la privilegioj argumentitaj de la advokato, la brita juĝisto devos pristudi unuamomente, kaj antaŭ ol pritrakti la plendo mem, dedici ĉu hispana reĝo, eĉ se eksa, povas esti juĝata en Britio.

Vorto de la Semajno

Advokato: Persono oficiale rajtigita defendi en juĝejo la interesojn de procesanto aŭ de akuzito.

*Pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj.
Leĝo estas bona, se advokato ĝin helpas.*

Advokataro: Korporacio de la advokatoj ĉe iu juĝocentro.

Senpaga advokato: Defendanto pagita de la Administracio, kiu celas defendi en juĝejo iun kun ne sufiĉaj viv-rimedoĵ.



Brita advokato de la 19-a jarcento

Jam estas tempo rekotizi por la jaro 2022

Memoru la kotizojn por la jaro 2022 de la membroj de IJEA.

Jara kotizo: 7 eŭroj, se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko.

14 eŭroj se vi loĝas en alia lando.

Membro-studentoj kaj membro-staĝantoj pagas nenion.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r